



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

MEMOROJ

pri la lastaj tagoj de Abato RICHARDSON.

*Al la tre apostola Paroĥestro de Bossey
kaj al la tre estiminda familio Milsom.*

Du pensoj alportas, al mia koro dolorigita pro la morto de nia amata Prezidinto RICHARDSON iom da konsolo: la unua estas la absoluta konvinko, ke lia bela animo ĝuas nun apud Dio la ĉielan ripozon. La dua estas la memoro pri la neforgesebla semajno, kiun li pasigis en mia hejmo *kelkajn tagojn* antaŭ sia morto.

Pro la graveco de lia kormalsano, lia kuracisto konsilis al li ne iri tiun ĉi jaron al la Esperantistaj kongresoj.

„Vi bezonas”, li diris, „absolutan trankvilecon, kaj longa vojaĝo povas esti fatala al vi”.

S-ro RICHARDSON, sentante sin en stato iomete pli bona je la fino de julio, decidis iri tamen al Berno kaj Romo por labori tie por nia duoble kara — katolika kaj esperantista — afero.

La kongreso en Romo estis konstanta priokupado por li. Trifoje ĉiusemajne ni ambaŭ interŝanĝadis leterojn pri tiu gravega afero.

Tuj kiam li konigis al mi sian decidon forvojaĝi, mi invitis lin trapasi Parizon kaj halti unu semajnon ĉe mia

nova kampara loĝejo, en la ĉarma vilaĝo de Montmagny (tute proksime al Parizo.)

La bona patro akceptis mian inviton, kaj la 2-an de Aŭgusto vespere, F-ino LARROCHE kaj mi lin atendis ĉe la Norda stacio. Li estis bonmiena, tute ne malsanaspekta.

Ni lin kondukis al Montmagny, ¹⁾ kie mia tuta familio ĝuis, dum ok tagoj, la agrablan, ĉiam bonhumoran kaj edifantan kompanion de tiu pia pastro. Kiom da karitato en lia koro! Kiom da boneco en lia animo!

Feliĉe, bela vetero fariĝis dum lia tuta ĉeestado ĉe mia hejmo.

Ĉar li bezonis ripozi, kaj spiri kiel eble plej multe bonan aeron, mi estis aranĝinta por li, en la florgardeno ripoz-seĝon kun skribtableto sub la ombro de larĝa figarbo. Tie li restadis dum la plej granda parto de l' tago, laborante preskaŭ senĉese, respondante al la multaj leteroj, kiuj alvenis al li. Dum du horoj ĉiutage, ni kune preparolis la aferojn de E. K. kaj de niaj kongresoj.

De tempo al tempo, li, sub sia figarbo, ricevadis la viziton de miaj du knabetoj, (el kiuj unu estas lia baptofilo), kaj la blankhara maljunulo ŝatis paroli kun ili, kaj respondi la sennombrajn demandojn de sia scivolema baptofileto.

— Ĉu vere, baptopatro, ke vi estas anglo? demandis inter multaj aliaj aferoj, la 3-jara scivolemulo.

— Jes, estas vere!

— Ĉu estas vi kiu bruligis Jeanne d'Arc?...

— Ho, tute ne, respondis ridetante Patro RICHARDSON.

Kaj la infano, kontentega pro tiu respondo kuris al sia patrino, dirante: „*Maman*, mi amas multe mian baptopatron, ĉar li diris al mi, ke li ne bruligis Jeanne d'Arc...”

Ĉe la tablo, aŭdi lin estis vera paradizo. Ĉiam li havis ion interesan kaj edifantan por rakonti. Lia vivo estis vivo de apostolo, kaj apostolo, kiu atingas la 70-an jaron vidis multe da aferoj.

Li konatiĝis en Montmagny kun mia paroĥestro S-ro

¹⁾ Montmagny kuŝas je unu kvarono da horo (per Norda fervojo) de Parizo.

Abato GARNIER, kaj lia frato Kanoniko GARNIER, famekonata en Francujo, kiel oratoro kaj fondinto de la Ligo de la Evangelio. Li dormis ĉiunokte en ilia domo. Ambaŭ loĝas najbare al mia domo kaj direktas seminarion. Li tute entuziasmiĝis pri tiu Ligo de la Evangelio.

Mi mem servis lian meson. ĉiutage, en la „Kapelino de N. D. de Lourdes”. Li multe ripozis dum tiuj tagoj, kaj, post unu semajno, li decidis daŭrigi sian vojaĝon, kaj iri al Bossey ĉe S-ino Milsom.

Strange! Patro RICHARDSON havis la antaŭsenton de sia tre proksima morto ĝis tia grado, ke, kiam venis la forira momento, kaj mi proponis aĉeti por li revenbileton — multe pli profitan, ol simpla, — li nepre rifuzis, dirante: „Kial, kara amiko? Ĉu mi iam revenos? Ĉu eĉ mi atingos Romon? Mia vivo estas en la manoj de Dio, kaj mi je ĉiu momento povas esti forprenata de Li. Ne do aĉetu revenbileton!”

Li, cetere, dum la tuta tempo de sia ĉeestado parolis al mi pri la aferoj de I. K. U. E., kvazaŭ mortonta baldaŭ, esprimante siajn dezirojn pri la estonta prezidanto, k. t. p.

La 11-an de Aŭgusto matene, mi lin kondukis Parizon, ĉe la Lyona stacio, por foriri al Genève. Ho ve! kiam mi lin kisis adiaŭe kaj ricevis lian benon, mi ne povis pensi ke mi ne plu lin revidos en tiu ĉi vivo...

De la 12-a ĝis 20-a de Aŭgusto, li estis la gasto de S-ino Milsom kaj de S-ro paroĥestro en Bossey, — lasta franca vilaĝo apud Svisa landlimo.

Li trifoje el tie skribis al mi por la kongresaj aferoj, — parolante samtempe pri sia bonsano kaj sia entuziasma admiro por monto Salève, ĉe la piedo de kiu, ho ve! lia korpo nun ripozas...

La 19-an de Aŭgusto vespere, li petis la fratinojn de S-ro Paroĥestro pretigi siajn aferojn por foriri frue al Berno la morgaŭan tagon.

Ĝis la deka nokthoro, li parolis pri spiritaj aferoj kun pia farmistino, kiu deziris ricevi liajn konsilojn. Li priparolis la feliĉon de la ĉielo kun tia fajro kaj entuziasmo, ke li ŝajnis esti en ekstaza stato.

Tia estis lia lasta konversacio

Du horojn poste, la fratino de S-ro Paroĥestro estis subite vekita per elvokoj; ŝi leviĝis kaj alkuris en la ĉambron de la Patro. Li estis sufokanta. Tuj li vidis, ke la lasta momento alvenis; li montris sur sia tablo kajereton de adresoj. Post kelkaj minutoj lia bela animo foriris. ¹⁾

La morgaŭan tagon, mi samtempe ricevis leteron de li kiu finiĝis kiel vera spirita testamento, — kaj telegramon de S-ino Milsom, anoncanta la funebran okazon.

Mi estis baldaŭ forironta al Berno; mi alkuris al Bossey, kie, dum tri tagoj, mi spertis la afablegan gastemecon de la familio Milsom, kaj preĝis apud la ĉerko de nia Patro, ekspoziciita en la preĝejo, atendente la ordonojn de liaj parencoj.

Fine, post longa interparolado — aŭ pli vere intertelegrafado — estis decidite, ke li ripozos en Bossey mem. La enterigo okazis la 25-an de Aŭgusto je la 9-a matene.

Tiun simplan, sed kortuŝantan ceremonion mi neniam forgesos.

La vetero estis bela. Post la meso, la ĉeestantaro, akompanante la funebran veturilon, eniris la mallarĝan ŝtonvojeton kiu, suprenirante, kondukas al la tombejo.

Preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj ĉeestis, ĉar kvankam la Patro restis malmulte da tempo en Bossey, li estis jam konata kaj amata de ĉiuj.

La junulinoj kovritaj per blankaj vualoj, iradis antaŭ la ĉerko.

Mi iris tuj poste, akompanata de niaj Bossey'aj samideanoj, kaj portante la standardon de I. K. U. E. (solene benita de Pastro RICHARDSON en Montserrat). Kaj ĝiaj oraj franĝoj kaj ĝiaj ekstremaj faldoj ripozis sur la ĉerko mem.

Ĉe la tombo mi lin adiaŭis, je la nomo de ĉiuj katolikaj Esperantistoj.

Unu horon poste, kun dolorigita koro, mi foriris al Berno.

La morgaŭan tagon okazis, en la katolika preĝejo de la kongresurbo, funebra meso por lia animo. S-ro Pastro

¹⁾ S-ro Paroĥestro tiam forestis, pro sia jara retrato.

LAJOS, el Debreczen (Hungarujo), diris kelkajn vortojn pri la mortinto, kaj mi mem rakontis al la ĉeestintoj tion, kion mi tie ĉi ĵus skribis.

D-ro ZAMENHOF, kun sia familio ĉeestis la Diservon, volante alporti supreman homaĝon al tiu, kiu estis senlace, ĝis la lasta minuto, unu el la plej fervoraj kaj plej amataj el liaj adeptoj.¹⁾

Ni, ho ve, perdis patron! Sed mi estas certega, ke, el la ĉielo, li ne forgesos tiujn, kiujn li tiel multe amis sur tero. Li helpos al ni, kaj, havante tian protektanton kaj tian modelon apud Dio, ni alvenos nedubeble al la fina venko.

Beati mortui, qui in Domino moriuntur.

CL. COLAS.

P.S. Estas por mi *nepra certaĵo*, ke la sukceso de nia gravega Pilgrim-kongreso en Romo kontraŭ kiu stariĝis multspecaj malfacilaĵoj, kiuj mirinde malaperis, — estas ŝuldita ne al mia propra agado, kiel tro bonkore proklamis D-ro SMULDERS, sed al la helpo, kiun, el la ĉielo, nia kora mortinto donis al ni. La Sankta Eklezio permesas alvoki preĝojn de piaj mortintoj, eĉ ne kanonizotaj.

Ni do uzu tiun permeson!

PAROLADO DE S-ro CL. COLAS
apud la ĉerko de Patro Richardson en Bossey.
(25 Aŭgusto 1913).

Je la nomo de la *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista*, mi konsideris kiel devon, veni el Parizo, alporti al tiu, kiu estis por ni pli ol Prezidanto, pli ol Ĉefo, sed amiko tre kara, kaj vera Patro, la homaĝon de nia dolorplena bedaŭro.

¹⁾ La Vendredon antaŭe, S-ro Edmond PRIVAT, akompanata de Ĝenevaj samideanoj lin estis adiaŭinta nome de la ĝenerala movado Esperantista.

Lastan vendredon, oni ¹⁾ jam rememoris, apud ĉi tiu ĉerko, la mirigantan sindonemon, kun kiu S-ro Abato RICHARDSON laboradis por la disvastigo de la nobla ideo de lingvo internacia. Kaj certe, kiam la homaro ĝuos tiun grandan bonon, oni lin nomos inter tiuj, kiuj plej multe kunhelpis al ĝia triumfo.

Sed al ni, kiuj estis intimoj por li, al ni, al kiuj li malfermis sian tutan animon, apartenas la rajto kaj la devo diri, kiaj estis la motivoj, kiuj incitis Abaton RICHARDSON sin dediĉi al tiu noblega afero.

De lia ardanta karitato, de lia grandega boneco, kiu reflektiĝis sur lia bela vizaĝo de maljunulo. — kun afabla rideto, kiu altiradis la korojn — de lia fervoreco en ĉiuj liaj agoj, *ni* konas la fonton. *Ni* scias, ke ĉio ĉi tio devenis de lia amo al Dio, amo al Kristo, amo al la Eklezio, al kiuj lia fajra kaj rekta animo, soifanta la Veron, sin estis tute dediĉinta.

Li estis sanktulo, kaj, en lia dezirego konkiri animojn al Dio, li preterlasis nenian rimedon. Dio sola konas la nombron de tiuj, kiujn li konsolis, konvertis, kaj savis.

Li komprenis, ke Esperanto povas *kaj devas* esti ilo por fari pli da bono, por disradiigi pli bele la Veron, por alkonduki pli da animoj al Dio kaj al la Eklezio, por labori pli efike je la efektivigo de tiu Evangelia parolo, lia devizo: „*Unu ŝafaro, kaj unu paŝtato*”.

Kaj ni scias kiamaniere li, post la morto de Abato PELTIER, kondukis la movadon, donante al ĝi praktikan orientiĝon, kaj montrante al tiuj, kiuj ankoraŭ dubis pri ĝia utileco, la tutan bonon fareblan per ĝi.

Karega Patro! Ĝis la lasta momento, li laboris kun miriga sindonemo por tiu bela verko. Malgraŭ la malbona stato de lia sano, li venadis tamen al ĉiuj niaj kongresoj, kies organizanto kaj animo li estis.

Li estis iranta al Berno, kaj al Romo, kie li devis mem prezenti al la vikario de Jesu-Kristo la katolikan Esperantistaron.

¹⁾ S-ro Edmond PRIVAT.

Ho ve! la antaŭsento, kiun li havis, ke li ne atingus la Eternan Urbon, malfeliĉe realiĝis.

Kaj li devis nin forlasi en ĉi tiu ĉarma vilaĝeto de Svisujo, pri kiu li ameme paroladis, kaj kie li ĝuadis la plej afablan kaj amikan gastadon. Kaj jen li ripozas nun je la piedo mem de tiu belega montaro, kies belecon li entuziasme priskribis al mi, antaŭ kelkaj tagoj.

Granda estas nia doloro, ĉar ni estas de nun orfoj!

Ni ploras kaj ni ploros ankoraŭ longtempe pri nia bona patro!

Sed ni ne similas al tiuj, kiuj vidas nenion trans la tombo. Ni ploras, sed ne kiel tiuj, kiuj estas sen espero.

Ni scias, ke nia kara mortinto foriris al Dio, en mondon pli bonan, kaj ke, post tiel bele plenigita vivo, lia animo ĝuadas nedireblan feliĉon.

Mi havis, antaŭ malmulte da tagoj, la grandan feliĉon lin gastigi en mia hejmo. Kaj, inter la multaj edifantaj historietoj, kiujn li tiel perfekte sciis diri, li ŝatis ripeti al mi la promeson de lia „kara sanktulineto” Fratino Thérèse-de-l’Enfant Jésus” ¹⁾ *esti utila* al la vivantoj post la morto..

Tre amata Patro! Memoru tiun parolon. El la ĉielo, memoru viajn infanojn! Restu vi kun ni, kaj obtenu de la bona Dio, kiun nun vi vidas en la lumo de la ĉielo, ke ni estu ĉiam fidelaj al nia devo, kaj ni havu la forton kaj la kuraĝon daŭrigi, ĝis la fino, la de vi komencitan laboron!

LA KIEW'A PROCESO.

Protesto.

Laŭ kelkaj ĵurnaloj ŝajnas, kvazaŭ ne estus lojala al la katolika tradicio ĉiu, kiu montras bonvolon al la Hebreoj

Noto. — Tiu parolado estis eldirita en franca lingvo. Poste S-ro COLAS diris kelkajn frazojn de adiaŭo en Esperanto.

¹⁾ Fratino Thérèse-de-l’Enfant Jésus, el la Karmelo de Lisieux (Francujo) mortis antaŭ kelkaj jaroj „en odoro de sankteco”. Jam mirakloj okazis je ŝia invoko, kaj multegaj personoj pilgrimas al ŝia tombo.

kaj deziras senkulpigi ilin de ia komuna kaj abomena akuzo.

Kontraŭ tiu opinio ni sentas nin devigataj energie protesti, tiom pli, ke iel malfavora juĝo ŝajnas esti direktata kontraŭ la Kardinalon, kiu estras la Eklezion en nia lando. Sed unue, estu permesate al ni citi la gravegajn deklarojn de alia angla prelato katolika pri tiu temo.

Kardinalo Manning skribis en 1883 al la Ĉefrabeno, S-ro Adler, pri la Tisza Eszlar'a proceso (de rita mortigo):

„Vi nur agas al mi juste, opiniante, ke mi nek kunsentas, nek kredas je tiuj abomenaĵoj.”

La sama kardinalo deklaris al hebrea delegitaro, en sia episkopa palaco, ke: „li ne estus fidela al sia propra religio, se ilian li ne respektigus.” Kaj jen letero de la nuna Ĉefepiskopo de Westminster, Kardinalo Bourne:

Al la tre Reverinda
la Ĉefrabeno.

Ĉefepiskopa palaco
Westminster S. W.
la 25-an de Septembro 1913.

Sinjoro!

Kun bedaŭro mi ekscias, ke denove estas starigataj en Ruslando akuzoj pri rita mortigo. Kiel vi diras, la Katolika Eklezio, laŭ mia tuta kono, ĉiam konstatis, ke tiuj akuzoj havis nenian bazon, ĉu en la religio, ĉu en la kredo aŭ praktiko de la hebrea popolo. Mi esperas, ke tiu konstato estos baldaŭ ĉie akceptita, kaj ke, se krimo estas farita, ĝi ne estos aljuĝata al motivoj, kiuj ne ekzistas en realeco.

Kredu min fidele via

(*subskribita*) Francis Kardinalo BOURNE.

Sed okazis, ke kelkaj ĵurnaloj malkontentiĝis pri tiu deklaro de la Kardinalo. Ili pretendis, ke la Kardinalo estis trompita; ili eĉ dubis pri la aŭtentikeco de la letero. Ni povas *certigi*, ke la Kardinalo vere skribis la leteron, kiu estas aljuĝita al li, kaj, plue, ke li skribis ĝin kun multe plibona kompreno de la tuta afero, ol ŝajnas havi lia kritikanto.

Mankas la loko por citi la plenan tekston, sed la tuta

argumento de la ĵurnalisto nur konsistas el tio, ke la kato-
lika Eklezio ne povas proklami, ke tiuj akuzoj estas
senbazaj, ĉar ĝi kanonigis la junan Simon'on de Trento,
kiu estis mortigata per tiaspeca krimo.

Al tio ni respondas, ke eĉ se oni ekzakte povus diri,
ke Simono de Trento kaj aliaj tiaj infanoj-martiroj estis
kanonigitaj, tiu aprobo de publika alpreĝo *neniel* koncernas
la demandon pri rita mortigo.

Eĉ se la Eklezio konstatis, ke tiuj infanoj estis mortigataj
de la Hebreoj „in odium fidei” (pro malamo al la Krist-
ana fido),— do, ke ili suferis martirmorton — tio neniel estus
aserto, ke tiu faro estis motivita de la ritoj de la hebrea
religio.

Kiam la regionaj pastroj petis de la papo Sixtus V, ke
estu kanonigita la infano-martiro Simono, ili nur diris, ke
la infano estis mortigata de la Hebreoj kiel moko al Kristo;
kaj la Papo en sia dekreto nenie *diras aŭ sugestias*, ke
Simonon oni ofermortigis pro ia rita celo; li eĉ ne insistas
pri tio, ke Hebreoj mortigis lin.

En la nunaj cirkonstancoj do, dum sovaĝajn kaj fanati-
kajn akuzojn oni direktas kontraŭ la Hebreojn, ne mal-
multaj fervoraj katolikoj deziras montri al la Hebreoj loĝ-
antaj ĉe ni, ĉian bonvolemon kaj simpatian.

Kunsentanto E. T. M.

(Laŭ la „Tablet” de la 25-a de Okt. 1913.)

LA KONSTANTINA JUBILEO.

Sinjoro,

Hieraŭ venis al mi la penso, ke la Katolikoj estas la
solaj, kiuj oficiale kaj vere festas la mil sescentan datre-
venon de la Konstantina Edikto por la Libereco de la
Eklezio.

Tiu ideo frapis min: Kial Anglikanoj kaj Presbiterianoj
ne festas ĝin? Pro tio, ke ili ĉagrene konscias, ke ne al
ilia Eklezio Konstantino donis la Liberecon!

Verdire, mi legis en la „Church Times,” la plendon de

maltrankvila animo, kiu demandas al si, kion faras, rilate al tio, la Anglikanoj? Povas esti, ke kelkaj aliaj inter la Anglo—Katolikoj estas same perpleksaj kiel tiu persono. Ili eĉ neniam estus rimarkintaj la aferon, se unue la Papo ne estus altirinta al ĝi la atenton de la mondo. Sed ĉar li tion faris: „Ho, ho!” ili kredeble rimarkis, „tion ni ne toleros! Ni ne permesos, ke li faru ĉion? Senutile estas nomiĝi „Primitivaj Kristanoj”, aŭ „Katolikoj”, se ni ne interesiĝas pri ĉi tio”. Sed, ho ve! la Anglikana Eklezio, entute, kaj ĝiaj episkopoj kaj pastroj, saĝe lasas la datrevenon pasi en silento. Se ili invitus siajn eklezianojn eltrovi kunrilaton inter la kreaĵo de Henriko VIII-a kaj la Eklezio de Imperiestro Konstantino aŭ S. Silvestro, la Roma Pontifiko, — tio estus iom tro naiva!

En Skotlando ni havas kelkajn altflugistojn — spiritajn aviadistojn, por tiel diri — , sed, laŭ mia konstato, ne eĉ unu sola kuraĝis sugestii, ke Konstantino pensis pri John Knox, pri „Kirk Kunsidoj”, aŭ pri „Diakonaj Kortumoj”, kiam li ediktis Pacon por la Eklezio! Ekster tiuj du naciaj religiaj organizaĵoj ne troviĝas kredeble en Granda Britujo iaj entuziasmoj por la teorio de Kontinueco kaj de Apostola Pastrosekvo.

Proklamante la Konstantinan Jubileon, do, Pio Deko senkonscie aperigis kelkajn novajn ideojn pri la postuloj de grupo, kiu pretendas esti Katolika kaj Apostola. Li ĵetis brilan lumon, antaŭ la okuloj de la mondo, sur la „belan izolecon” de la hodiaŭa Roma Eklezio kiel rekta posteulo de la Eklezio de la unuaj jarcentoj.

(Subskribita)

HENRY G. GRAHAM.

(Eltirita el „The Tablet”, 11-an de Oktobro 1913.)

Nia Sinjorino de bona Helpo,
Motherwel, la 26-an de Oktobro.

Mediolana Edikto.

Plenumiĝis la profetaĵo de Daniel: Sur ruinoj de la grandaj, tropotencaj regnoj de mondo elkreskis la regno, kiu ensorbis en sian organison regnojn kaj popolojn kaj fariĝis universala eksponento de la homa penso, kaj kunigante sub unu sceptro ĉion kaj ĉiujn, ekkreis tiun pernenio subigeblan roman imperion.

Tiam sub protekto de la potenca imperio giantiĝis roma civilizacio kaj ŝajnis, ke tuta homaro plijuniĝos, plifeliĉiĝos kaj pliperfektigis. . . . sed kune kun kreskis voluptemo kaj frenezeco kaj sub la kovro de ŝajna ordo kaj feliĉeco kaŝis sin malĝojo kaj angoro. Potenco, ĝuo, volupto laŭvide, kormalpleneco kaj malkontenteco interne; gajeco laŭvide kaj malespero en profundeco de koro; libereco, sendependeco, senĝeneco ĉe unuj, troterurega sklaveco ĉe aliuloj; senlima ekmaterialigo de pensoj, de penadoj, de la animo, eĉ komplete ekneniigo de la animo. . . . karakterizadis la tempon, kiam la tuta homaro en profundeco de koro atendis ion eksterordinaran, nekonatan. Tempo fariĝis tro malgajaj, kaj sur superba trono de supermondaj cezaroj eksidiĝis la posteulo de Aŭgusto, la plejmalgaja el inter homoj, cezaro Tiberiuso. Dum regado de ĉi tiu malgajega kaj severa solulo eklumiĝis en Oriento, malproksime de la centro de potenco kaj fiereco, aŭroro de la Kredo, kiu devis faligi antaŭan kulton de eraro, renaskigi la homaron kaj alporti al ĝi konsolon.

Venis Sendinto de la Ĉielo kaj naskiĝis de la plejsankta Virgulino ne konanta la viron. Kio? — ĉu ĉi tio povis fariĝi? — Jes, ĉar ĉe Dio nenio povas esti nepovebla: Adam estis ekkreita sen patro kaj patrino, Eva fariĝis sen pero de patrino el de karno de Adam, Kristo naskiĝis sen pero de viro el de karno de la senmakula Virgulino. Ĉi tiu per sia ofero sur la Golgota kaj sia reviviĝo malfermis al mizeraj malfeliĉaj homoj pordegon de la Ĉielo, reviviginte malfeliĉan, en koto de materialismo kaj volup-

temo malĉastiĝantan homan animon. Li ne fondis ian novan religion, kiel ekz. poste faris Mahomet, aŭ ĉiuj hereziuloj, Li nur pliklarigis la veran religion kaj ekvokis ĉiujn popolojn al la vera religio, kaj per pero de sia ofero donis povon al ĉiuj homoj aparteni al la religio, en kiu sola estas la savo, ĉar la religio ne estas io ajn alia ol nur la ligo kun Dio. Tiu-ĉi ligo ekzistis ankaŭ antaŭ alveno de Kristo, nur ne ĉiuj popoloj povis al ĝi aparteni estante malĉastaj kaj sub povo de diablo, kaj tiam la savo en la religio dependis de la espero de alveno de Kristo.

Malrapide sed konstante disvastiĝadis la Evangelio, unue en orientaj landoj de la roma imperio, kaj poste en okcidentaj provincoj kaj en la metropolo de la mondo mem. Kun kreskado de la Eklezio pliakriĝis rilato de tiu-ĉi al la imperio, kaj la interbatalo inter tiuj-ĉi du tiel malsimilaj organismoj fariĝis des pli ne evitebla, ju pli pliprofondiĝis la abismo disiganta antikvan Romon de la kristana Romo. Komence ĉefan rolon en tiu-ĉi konflikto de la du malsamaj mondoj formis la politika faktoro. Romanoj komprenadis religion ĉiam kiel la regnan institucion, do ĉiu malsuprigo de la aŭtoritato de la religia kulto devis esti ŝatata kiel ektuŝo de la ekzistanta ordo. Sur tiu-ĉi bazo la kristanoj estis konsiderataj ĉiam pli kiel danĝeraj por la publika bono, kiam estis ĉiam pliĝenerale konata, ke ili forkuras de oferoj al diaĵoj, de festoj dediĉitaj al diigado de cezaroj. Sed de la dua jarcento, krom politika, alvenas ankaŭ la religia faktoro kontraŭ la kristanoj, kiel dum tempoj de Trajano kaj Hadriano kaj poste, kiam la popolo mem estis senmezure furiozigita kontraŭ la kristanoj. Ĝi kunmetis el kompleta malkompreno esencon de la nova kredo, instigata per kalumnioj disvastigataj de judoj, kaj nome, ke la kristanoj estas ateistoj, nelojaluloj, infanmanĝeguloj trinkantaj vivan homan sangon k.t.p. Respondo de kristanoj je la kalumnioj estadis martira heroece suferata morto, aŭ apologioj, skribitaj de tre kleraj kristanaj filozofoj. Martiroj fariĝis la tre potenca rimedo de la religia propagando, ĉar sango de la martiruloj fariĝis la semaĵo de la kristanismo. Kaj la apologioj pliprofundigadis la ekkomprenon de krist-

ana kredo ĉe pensemuloj, kaj ekkonvinkadis la filozofojn kaj la aristokratulojn. Sed malgraŭ tio la vojo al venko estis malfacila kaj longa kaŭze de diversaj kontraŭaĵoj, kun kiuj la kristanismo devis batali, kiel kun herezioj, kaj kun la roma imperio defendanta komence kun la fiereco kaj fine kun malespero siajn regnajn diaĵojn venkatajn silente, sen sangelverŝo, sed konstante de la kristanismo. Sekvis la terura persekutado de kristanismo dum la III jarcento, sed tamen la kristana demando estis por la Romo vere grava politika problemo, de kies solvo estis dependa la estonteco de la imperio mem, kiel ankaŭ de la Eklezio. Ne scipoviŝ solvi ĝin tiel lerta en administracio imperatoro Diokleciano. La premegeca sistemo kaj terorismo, kiujn li ekuzis, ne estis alportinta deziritajn efikojn. Responde je tio-ĉi estis la kreskanta fanatismo de homamasoj kaj konfido je venko de la sankta afero, altigita ĝis tuta malŝatemo de la terura alitempe majesteco de la morto. Do la kristana demando estis dum la abdiko de la maljuna imperiestro tiel malfacila kaj danĝera por la regno, kiel ĝi estis je komenco de lia regado, nur eble kun tiu-ĉi ŝanĝo, ke nune konsideri la kristanismon kiel potencan politikan faktoron, devis fariĝi la indiko por la heredantoj de la trono. La edikto de la imperiestro Galeriuso donita en la jaro 311 en Nikomedio malfermis novajn regionojn antaŭ la ĝis nun humiligata ideo, permesante al la kristanoj vivi en paco kaj plenumadi la ceremoniojn.

La morto de Galeriuso, kiu sekvis baldaŭ post eldono de la nikomedia edikto, malfermis periodon de komplikiteco kaj de malpacoj en la roma imperio. Komenciĝas batalo inter kvar plejsuperaj estroj de la imperio, kaj el ĝi ne pli frue ol post longaj jaroj ekaperis kiel solreganto la filo de Konstanciuso kaj de Heleno, la Konstantinus. Kun historio de kristanismo kuniĝas tre precize la unua triumfo de la imperiestro, kies atestanto estis la Mulvia ponto super la Tibro. Apud ĝi Konstantinus faris la 28 de Oktobro 312 malvenkon al la en Romo proklamita cezaro Maksenciuso. De ĉitie li antaŭ siaj militistaroj eniris en la eternan urbon.

Laŭ la raporto de Eŭzebiuso, la samtempa episkopo en Cezareo, Konstantinuso ekrimarkis sur la ĉielo en antaŭtago de la batalo signon de kruco. La kruco havis greklingvan enskribon: „per ĉi tio venku”, kaj dumnokte montriĝis al li Kristo kaj ordonis meti Sian signon sur romaj standardoj. Konstantinuso vere venkis kaj ordonis starigi en Romo sur unu placo statuon kun la kruco en mano. Poste li senprokraste ekdecidis doni liberecon al la anoj de nova Kredo kaj dum unuaj monatoj de la jaro 313 li entreprenis ekfikon de sia volo kaj kunveninte kun la kunreganto Licinuso en Mediolano li eldonis kune kun ĉitiu, eterne memorindan akton de egalrajtigo de la kristana religio, konatan en historio kiel *mediolana edikto*.

Supre nomita Eŭzebiuso liveras en sia „historio de la Eklezio” sekvantan enhavon de tiu-ĉi edikto, pri kiu la leĝdonintoj ordonis sciigi ĉiujn regatojn, kaj kiu estis sendita al ĉiuj prefektoj. La edikto enhavas jenon:

„Jam antaŭe konvinkitaj, ke oni ne devas malpermesadi „liberecon de la religia konfeso laŭ sia propra elekto, ni „eldonis la ordonon, por ke ĉiuj, do ankaŭ la kristanoj, „konservadu fidele elektitan de si konfeson. Sed ĉar en „tiu edikto, en kiu estis donita al ili tiu-ĉi libereco, estis „ŝajne multaj diversaj limigoj precize entenitaj, do povas „esti, ke iaj el inter ili sin deténadis ne longe poste de „tia konservado de sia religio. Kiam do ni, t.e. mi, imperiestro Konstantinuso, kaj mi, imperiestro Licinuso, feliĉe „kunvenis en Mediolana kaj ekkonsideris ĉiujn aferojn „rilatantajn bonon kaj feliĉecon de la regno, inter aliaj „decidoj, kiujn ni opiniis kiel utilajn por la publiko, kaj „plivere antaŭ ĉiuj tiuj ĉi decidoj, ni ekŝatis kiel konvene, „eldoni la ordonojn rilatantajn religion, nome, por ke doni „al la kristanoj kaj ĝenerale al ĉiuj povecon kaj liberecon „elektadi laŭvole la religion; kaj ni faris tion-ĉi tiacele, „por ke la dio, kia ajn li estas sur la ĉielo, bonvolu esti „favora kaj indulgema por ni kaj por ĉiuj niaj regatoj. Tial, „post bona kaj tre konsciencia konsidero, ni ekdecidis doni „tiun-ĉi ordonon, ke al iu ajn, ĉu iu elektis al si la kredon „de kristanoj, ĉu alian religion, kiun li opinias por si la

„plej konvena, tute ne devas esti en tiu-ĉi rilato rifuzata „la liberecon, por ke la plejalta dio, al kiu ni senĝene de- „diĉas adoron, bonvolu montri al ni en ĉio sian gracon kaj „favoron. Tial via prefekta Moŝto eksciuj nian volon, „por ke forpuŝinte ĉiujn senescepte limigojn, kiuj en nia „unua al via Moŝto sendita skribaĵo rilate al la kristanoj „estis entenitaj, kaj nuliginte la aranĝojn, kiuj entute „ŝajnas esti malfavoraj kaj fremdaj al nia malsevereco, de „nune ĉiuj tiuj, kiuj volas plu aparteni al la kristana kredo, „povu sen ia ajn malhelpo kaj malfacileco, libere kaj mal- „kaŝe konfesi tiun-ĉi religion. Ni ekdecidis sciigi precize „vian zorgemon, por ke vi sciu, ke ni donis al la kristanoj „per nenio limigitan liberecon konfesi sian religion. Kiam „ni ĉi tion konsentis al tiuj-ĉi, ekkomprenu via Moŝto, ke „je nomo de paco de niaj tempoj estas lasita ankaŭ al „aliuloj kompleta libereco konfesi sian religion aŭ riton, „por ke ĉiu ajn posedu senĝenecon elekti al si kaj adori „laŭvole la dion. Kaj ni faris tion-ĉi tiacele, por ke oni ne „pensu, ke ni en io ajn forprenis la rajton de ia ajn adoro, „aŭ ia ajn religio.”

Hieronim WIERSCHOWSKI.

Lwow (Galicio).

Ekskursoj kaj Pilgrima Vizito al la Sanktaj Lokoj de l' Eterna Urbo.

Daŭrigo.

PANTHEON — MONUMENTO VITTORIO EMMANUELE —
VIA ALIBERTI.

For de l' Koloseo ni preterpasis la Arkon de Konstantino, konstruita en la jaroj 312—315 en honoro de l' glora imperiestro Konstantino, kies venkon kontraŭ Maxencius en la batalo de l' „Ponte Molle” ni estas festiĝantaj speciale en ĉi tiu jaro 1913, hodiaŭ post 16 jarcentoj. La enskribo diras, ke ĝi estas dediĉata „de l' „S.P.R.” (Ĉu vi memoras, ke ĉi

tiu signo ankoraŭ estas videbla ĉe ĉiu tramhaltejo -tabulo?) t.e. de l' Senato kaj Popolo Romana (Senatus Populusque Romanus) al imperiestro regnestro Flavius Konstantinus, la plejgrandulo, la pia kaj feliĉa Augustus, kiu „instinctu divinitatis” per instigo de l' Dio kaj lia granda spirito venkis (Maxentium) la tiranon kaj samtempe ĉiujn kontraŭulojn kun ĝustaj armiloj”.

Kiel paragonon de antikva kaj moderna arto arĥitektura nun tuj ni estos vidintaj la „modernan nacian monumenton” de Italujo, la monumenton de „Vittorio Emanuele”. Ĝi ne estas ankoraŭ plenkonstruita, malgraŭ la jam farita laboro de 25 jaroj kaj malgraŭ la 45 Milionoj da frankoj (18 Milionoj da spesniloj) jam elspezitaj. Montras ĉi tiu sola ekzemplo, ke multfoje ankaŭ en Italujo la eminentuloj eraras koncerne la ŝtatspezoj je malmultaj spesdekoj. Ĝis nun por la monumento „Vittorio Emanuele” tiamaniere erare nur elspeziĝis 25.000.000 Liroj (t.e. 10.000.000 Sm.) pli ol estis skribitaj en la budĝeto kaj neniu ankoraŭ scias, kiam oni finigos la laboron kaj kiam la konstruistoj havos sufiĉe da gajno. La sola orumado de l' ĉevalo, sur kiu Vittorio Emanuele sin prezentas al la pasanto, kostas laŭ diro de l' gvidinto 200.000 Sm. aŭ $\frac{1}{2}$ Miliono da Liroj. La tuta statuo kun ĉevalo, simbolo de unueco de la itala nacio, estas kalkulata 2.000.000 Lirojn aŭ 800.000 Sm. Ĉu en 1935, okaze la jubilea kongreso en Romo ĝi estos perfekte starigita? Ni vidu! Ĝis tiam adiaŭ!

Apenaŭ en veturiloj niaj sudlandaj rapidegaj, kaj sen ia pago multlaboremaj, veturilistoj, dum manĝo kaj dormo, vivo kaj morto kun iliaj vagonetoj kaj ĉevaletoj kunligitaj, irigis ĉi tiujn, por denove ilin haltigi baldaŭ ĉe la „Piazza della Rotonda”, kie antaŭ nelonga tempo okazis la atenco kontraŭ la itala reĝo, feliĉe sen sukceso. En mezo de la placo, granda fonto spruĉas freŝan akvon al ĉiu akvon bezonanta kreitaĵo, al ŝtono de l' strato kiel al homo, kiu ne rajtas trinki vinon aŭ italajn likvorojn en la tutproksima trinkejo, kie unu kara kongresano preskaŭ estas mortofalinta suben, tra la malfermita kovrilo de l' planko, en la malsuprenejojn de l' tero. Ĉu li hodiaŭ ne plu estas mort-

pala de post la terura katastrofo? Se li legos ĉi tiujn liniojn, li speciale estu salutata tutkore kaj oficiale gratulata je lia venko super la atenco de l' Sorto. La kontraŭalkoholitoj, kiuj ne bezonis vinon, sed kontentiĝis kun la akvofonto, certe uzis la liberan tempon en la veturiloj, por legi la enskribon en la obelisko supre de la fontano, kiu rakontas, ke Seti-Mienphta 1195 antaŭ Kristo kaj Ramses III, 1184 antaŭ Kristo, starigis la fonton kaj la obeliskon.

Fine ankaŭ la „Pantheon” sin vidigis al ni, kvazaŭ mal-laŭdinte, ke pro la multnombraj mukoj ni preskaŭ ne plu vidus la ĉielon. Nenie en la mondo, se ne en Romo, tia similaĵo okazas al la fremdulo. Li vidas tiom kaj tiom kaj post jaro, kiam li devas hejmen iri, li ne estas kaj neniam estos preta pri ĝi; ĉiam li ne vidis tion, pri kio li unue estis veninta Romon. Ju pli konita, des pli granda Romo sin montras al rigardanta okulo kaj diris jam Goethe en la jaro 1786, ĝusta prepariĝo por vizito de l' eterna urbo nur en Romo mem estas ebla.

La Pantheon estas unu el la plej belaj kaj plej originale restintaj antikvaj monumentoj, de l' antikva urbo, kiel templo, konstruita de Agrippa, bofilo de l' Imperiestro Aŭgustus. La „tabulo arvala” citas ĉi tiun, al ĉiuj dioj („Pan—Deos”) dediĉitan templon „Pantheon”, jam je la tempoj de Nero (59) kaj la historiisto Dio Cassius (200 p. Krn.) kiel konstrujaron, kalkulinte la jaron 729 de Romo (27 antaŭ Krn.), diras, ke la Pantheon ricevis ĝian nunan nomon pro tio, ke flanke de l' statuoj de Mars kaj Venus sin trovis kune granda amaso de aliaj bildoj de dioj Juliaj. La simbolo de la ekstera kaj interna kupola (43,5 radio kaj alteco) fermo signifas la terglobon kun la ĉiela plafono. En mezo supre estas ronda truo, la okulo, tra kiu sole la ĉiela lumo enpenetras, senkovrita ankoraŭ hodiaŭ por ĉiama memoro al tempo, en kiu oni oferis bestojn kaj eĉ homojn al la nekonataj dioj. Tiam la truo servis kiel kamento fortiriganta la fumon. La ekstera tekto iam estis tute orumita de l' oro, kiun oni poste forprenis por orumi kandelabrojn en la preĝejo de S. Pietro. La subtegmento estas farita de grandaj, parte rondaj kaj parte kvadratformaj

platoj de porfiro, granito, friga kaj numida marmoro. En la jaro 609 la papo Bonifacius la IV-a sanktigis „Pantheon” kiel preĝejon dediĉita al S. Maria ad Martyres. La festa malfermo, plibeligita per la alveturado de relikvoj amasitaj sur 28 vagonoj kaj la enterigo de ĉi tiuj relikvoj sub la „Confessio”, signifas la unuan „feston por ĉiuj sanktuloj”, poste de la Papo oficiale ordonita por la katolika tutmondo. Hodiaŭ la festo de ĉiuj sanktuloj okazas regule ĉiujare la unuan de novembro. Estas ankaŭ ĉi tie, kie estas enterigita Rafaelo, la „pentristo de anĝeloj” en la jaro 1520. Li mem elektis kiel tomban ripozejon ĉi tiun de li indan lokon. Lia amiko „Lorenzetto” elŝtonigis la statuon, kiu sin trovas dekstre de la tombo kaj lia tomb-enskribo, redaktita de l’ spirita kardinalo „Bembo” finiĝas per la vortoj:

„Jen la tombo de l’ Rafaelo! Zorgo atakis la patrinon de l’ vivo, por ke li malatakita ŝin venku; se li mortus, estus mortonta kaj li”.

En alia kapelo tute proksime oni preterpasis la monumenton de l’ granda ŝtatministro Kardinalo „Consalvi”, mortinta 1824, monumento ankaŭ de l’ konstruisto Thorwaldsen. Kiel la itala popolo hodiaŭ ĉi tiun sanktejon de l’ Pantheon honoras, ĝi montris per la enterigo de siaj unuaj reĝoj de unuigita Italujo. Ĉu ĉiuj el nia pilgrimanta rondo enskribis sian nomon tie en la malfermitajn librojn? Kiu ĝin forgesis, reiru kiel eble plej baldaŭ Romon, por sin eternigi por venontaj generacioj de l’ I. K. U. E., kiuj en plimalfruaj jaroj ĉiam denove iras ĉe niaj Papoj „ultramontes” en la eternan urbon ĉe la fonto kaj komenco de profana kultura kaj katolika religia vivo.

Bedaŭrinde dum nia restado en la Pantheon mi ne trovis sufiĉe da okazo kaj bezono por serĉi mian unuan enskribon de l’ 1906. La proksiman fojon mi ĝin faros.

Nun direkte al la „Piazza Colonna”, kiu sub la nova itala registaro iĝis la ĝusta komerccentra punkto. Ĉi tie ĉiuvespere oni povas vidi la Romanojn el ĉiuj popol-klasoj, kiel en „München” en la granda bierejo „Hofbräuhaus”, vera bildo de libera, publika vivo en Italujo. La nomo de l’ placo iĝis de la ĉi tie starigita kolono. Kvar grandegaj

kandelabroj ĉirkaŭstaras la kolonon kaj ŝprucas lumon al la popolamaso kunvenanta.

Nun la tempo nin nepre admonas serĉi kiel eble plej rapide la amatan „via Aliberti”. La via del korsio nin gvidas rekte al la „via Condotti” kie antaŭ 6 jaroj mi trinkis tiel malbonan lakton, ke mi ankoraŭ hodiaŭ dubas, ĉu estis vera bovina lakto. La fino de ĉi tiu vojeto estas flankita de la „Piazza di Spagna”, kun la fonto nomita „della vergine” (de la virgulino). Estas ĉi tie la ĉefplaco por la fremduloj. Por mi la placo havas grandan valoron. Ĉar tute flanke de la granda hotelo „Bavaria” mi iam loĝis ĉe samprofesiisto. Kontraŭposte estas la domo de l’ „Congregatio de Propaganda fide”, kie mi partoprenis la Jubileofeston de la 50-jara pastra vivo de la Kardinalo Gotti. Ĉu la Roma raportinto pri misionoj S-ro Pastro BIANCHINI ĉe l’ prefekto de la „propaganda fide” faris viziton kun la demando, kion oni pensas pri nia esperanta kunhelpo por la granda verko? Ĉu vi legis en la ĵurnaloj, ke antaŭ nemultaj tagoj antaŭ ĉi tiu palaco la kontraŭuloj de la katolika eklezio kaj de ĝia videbla kapo vatikana enscenigis skandalajn tumultojn?

Fine ankoraŭ du paŝojn kaj ni estis en „Via Aliberti”. Pri l’ tieaj okazintaĵoj pli kompetenta persono raportos.

Daŭrigo sekvas.

D-ro LEHNER,
St. Gallen (Svisujo).

Oficialaj Komunikoj.

LETERO DE NIA PREZIDANTO.

Karaj Gelegantoj.

En la nomo de la tuta Katolika Esperantistaro mi donas tutkoran dankon al nia kara kaj respektinda amiko P-ro POELL pro la Statut-projekto, kiu aperis en la Novembra Numero de E. K. Kiel li prave diris: „ankoraŭ naŭ mona-

tojn ni havas antaŭ Nia Kvina, sufiĉe da tempo por bone sciigi pri ĉiuj opinioj". Mi do konsilas kaj petas, ke vi serioze ĝin pripensadu kaj (kiel eble) diskutu kun viaj amikoj. Okaze ke vi ne ŝatas aŭ eĉ malaprobas ion, aŭ en la jam aperinta „Ĝenerala Regularo" aŭ en la aperonta „pli detala Regularo", mi jen petas, ke vi, ĉi tian malaprobon, (kun kialoj, sugestoj pri pliboniĝo, k.t.p.) sciigu al la Katolika Esperantistaro pere de E.K. Konservadi esprimon de malfavora kritikaĵo ĝis la lasta momento — ĝis la venonta kongreso — estus almenaŭ absurdaĵo. — Foren tia penso! Do se vi silentados, ni konkludos, ke vi aprobas la projekton.

Antaŭ kelkaj jaroj mi estis Vikario kun maljuna irlanda Pastro. Li estis antaŭ ĉio milda kaj ĝentila. En lia ĉambro ĉe la kamenbreto oni povis vidi, en grandaj ciferoj, la frazon: „Afablaj vortoj estas la muziko de la mondo". Laŭ ĉi tia devizo li ĉiam vivis. Pri tiu ĉi maljuna pastro, ĉiam memorigis min nia kara mortinto, Prezidinto P-ro Richardson, kies amindan, noblan animon ripozigu Vi, ho! bona Dio! (Mi bone scias, ke plenumi la rolon, kiun li tiel noble plenumis, tute superas mian kapablon — sed forpasu tio!) Kiel tre vere kaj trafe diris nia amikino S-ino Milsom la regulo de lia vivo ŝajnis esti:

„In necessariis unitas
In dubiis libertas
In omnibus charitas"

En katolika Esperantujo estus bone ke, en niaj rilatoj unu kun la alia, ni ĉiam memoradu ĉi tiujn vortojn, ĉefe: „In omnibus charitas".

Pastro Richardson bedaŭrinde formortis kaj nia movado sin trovas en la krizo de sia ekzistado, kaj jen staras la demando: Ĉu ĝi, aliiĝinte en ian specon de negrava, nese-rioza Ligo, velkos kaj fine mortos; aŭ ĉu kontraŭe, sin ordiginte, organiziĝinte, ĝi fariĝos grava Movado, — floras kaj decatempe naskos frukton, kiu sola povas atentigi gravajn homojn? Ke okazu ĉi tiu lasta, estas la deziro de ĉiu I.K.U.E.-ano inda je la nomo. Sed por tio estas necese,

ke ni laboradu praktike kaj tuj. Sed kiel? Kompreneble en la starigo de Nacia Ligo.

La Afero estas ofte malfacilega; sed ĝi estas ebla: Almenaŭ kelkaj el miaj alilandaj amikoj al mi tiel diris rilate al mia irlanda patrujo. Mi esperas, ke ili estas pravaj: eble, jes ofte, okazas ĉe mi, ke miaj najbaroj pli bone konas miajn proprajn aferojn ol mi mem. Mi scias, ke la Fido povas „movi la montojn” — kaj malhelpaĵoj, vere kiel montoj, kontraŭstaras min. Tamen „Esperon ne venkos nek fajro nek ŝtal’”; „Cent semoj perdiĝas” k.t.p. — Kaj por ni, katolikaj Esperantistoj, tia estas nia devo. Do karaj amikoj, de ĉi tiu, mia Okcidenta insula hejmo kiel nuna Prezidanto de I.K.U.E. mi jen alvokas vin: *Organiziĝu, Starigu Naciajn Ligojn* kaj tiam *antaŭen* kiel fratoj, mano en mano. Antaŭen ĉiuj — Polo kaj Ruso, Franco kaj Germano, Italo kaj Afrikano kaj Aŭstriano, Hispano kaj Amerikano, Anglo kaj Irlandano k. t. p.

I.K.U.E. bezonas vian helpon; ne vian disigitan helpon, sed vian kunigitan, ordigitan, organizitan kaj pro tio fortegan helpon. Ĝi bezonas ĉion, kio sin trovas plej bona en Katolika Esperantujo — ne nur la ageman persistecon de la Germano, sed ankaŭ la brilegecon, kiu karakterizas la Francon. Ho! kuniĝu ĉi tiuj lastaj kaj la mondo estas la nia. Ĉi tiuj grandaj landoj estas sufiĉe centraj kaj de ili orienten kaj okcidenten (eĉ trans la ondaron) rondradius lumego, kiu penetras la plej densajn nubelojn — atingus kaj lumigus la plej malproksiman angulon de la mondo. Ĉu ĉi tia ne estas „tre dezirinda celo?” kaj kial ĝi ne efektiviĝos? Ĉu estas eble, ke kelkaj etaj malkomprenaĵoj nin forbaras unu de la alia? Ni ne estas anĝeloj, sed homoj, homoj kun ĉia kulpo de la falinta homa naturo. Sed ni ĉiuj estas gefratoj. La sama patrino-Eklezio nin naskis, ni estas la gefiloj de la sama amata Patro Pio X, ni adoras la saman Sakramentigitan Dion. Do ni estu fratoj ne nur nome, sed kore. Mem mi respondos por la ĉefaj — mi volas diri — respondaj personoj en nia movado — ili ne nur *estas pretaj*, sed ege deziras akcepti ĉiujn (de kiu ajn lando) kun la brakoj malfermitaj en nian movadon.

Do, sub la protektado de Nia Sinjorino de la Espero, ĉiuj antaŭen al nia celo: „Unu Ŝafejo kaj Unu Paŝtato”.

A.M.D.G.

Espero Katolika.

„Espero Katolika” estas la Oficiala Organo de nia I.K.U.E. Ĝia disvastiĝo kaj disabono multe helpas al ĉi tiu nia movado. Do la jeno:

Ofte dum la lasta kongreso mi eletendis la manon al la Esperantistaj Pilgrimuloj, petante ilian helpon por la subtenado kaj antaŭenpuŝo de nia ĵurnalo. Tiam miaj vortoj trafis nur malmultajn el la Katolikaj Esperantistoj. Mi nun faras al ĉiu leganto de E. K. la saman peton. Mi petas ne nur vian simpation aŭ bonvolon aŭ neprecizajn ideojn de via helpo, *ne*, mi petas vian tutkoran *praktikan* kaj *tujan* helpon. Mi petas, ke ĉiu el vi antaŭ la Nova Jaro varbu por E. K. almenaŭ unu abonanton. *Al ĉiu* el vi mi faras ĉi tiun peton, estu li de kiu ajn lando.

Kiam vi parolas kun, aŭ skribas al, viaj geamikoj, se vi kredas aŭ suspektas, ke li, (aŭ ŝi), ne abonas E.K., ĉu vi ne povas, sen esti malagraba aŭ ĝenulo, peti ke li, (aŭ ŝi), ĝin abonu? Ĉu tio tro ĝenos vin? Kaj se ne, ĉu vi ĝin faros? Plie, inter la legantoj de E.K., sin trovas multaj, kies ideoj pri ĉi tiu temo estas tre sciindaj. Ĉu ili bonvole komunikos kun la Redakcio? aŭ verkos artikolon pri la plej bona maniero sukcesigi la ĵurnalon?

En Romo, kiam mi parolis pri E.K., miaj vortoj havis iome la eĥon de la malespero. Mi timis ĝian morton. De tiam mi sciigis pri diversaj cirkonstancoj, (rimarkinde pri la penoj kaj grandaj klopodoj de la Direktoroj), mi pripensadis la aferon de diversaj vidpunktoj, kaj la rezultato estas, ke en la nuna tempo, mi jen trafas tute diversan klavon, kaj parolas al vi, ne senkuraĝe, sed plenplena de espero. Do, karaj gelegantoj, kvankam mi insiste petas viajn klopodojn por E. K., (ĉi tiuj kompreneble estas absolute necesaj), ne pensu, ke vi vidas en ĉi tia „*insista peto*” eĉ ombron de malkuraĝo. Nia E.K. vivos, *florados*. (Jes, Sinjoro leganto, *al vi mem* mi tion diras.)

Sed, *se vi aŭskultas mian peton, se ĉiu el vi varbos*

unu novan abonanton antaŭ la nova jaro, tiam vi mem tuj rikoltos la rezultaton. E. K. pligrandiĝos, plibeliĝos — (ĉu ne S-roj Direktoroj?) Ĝi fariĝos ĵurnalo (eĉ de ĉi tia vidpunkto) inda de nia bela Movado — de nia Katolika Esperantujo.

Patrick PARKER.

Kilmyshall Ferns. Ireland.
La 24-an de Nov. 1913-a.

Adresoj de la Ĉefestraranoj.

Adreso de la Prezidanto de I.K.U.E. estas: P-ro Patrick PARKER, Kilmyshall-Ferns-Cowerfeld, Ireland; de la Ĝenerala Sekretario: P-ro J. BIANCHINI, Fontanafredde (Udine), Italia; de la Kasistino: F-ino M. LARROCHE, 55, rue de Vaugirard, Paris, France.

Akcia Societo „Espero Katolika”. Novaj Funkciuloj.

Prezidanto-Komisaro. La ĉefestraro de I.K.U.E. elektis, anstataŭ S-ron Knaapen, S-ron P. A. SCHENDELER, Mariaheide (apud Veghel), Nederlando.

Oni scias, ke la interesoj de la Akcia Societo „E. K.” estas komisiitaj al du Direktoroj (la administranto kaj la redaktoro de la gazeto E. K.) sub kontrolo de la ĉefestraro de I.K.U.E., kiu elektas tri kontrolantojn aŭ „komisarojn”. Por la facila kontrolado la Prezidanto-komisaro devas laŭstatute loĝi en Nederlando.

S-ro SCHENDELER estas tre fervora samideano, ano de la ĉefestraro de la Nederlanda Katolika Ligo Esp., verkisto de Esperanto-libroj (vidu Nov. n-o p. 309) kaj de gravaj artikoloj en „Nederlanda Katoliko”. La Idistoj trovis en li lertan kaj teruran kontraŭ-batalanton precipe en la nacia gazetaro. Pli ol unu idisto malbenos la momenton, je kiu li skribis gazetartikolon por publike kontraŭbatali Esperanton. Ankaŭ li estis kunlaboranto de E. K. (vidu Aŭg. 1912, p. 281).

Ni ne dubas, ĉu S-ro Schendeler kun sia kutima fervoro ankaŭ multe laboros por la florado de la Akcia Societo.

Religia Direktoro. La Episkopo de Buskoduko (Nederlande: „'s Hertogenbosch”), en kies eparkio estas la sidejo de la Akcia Societo „E. K.”, bonvolis elekti P-ron Poell kiel religian direktoron de la eldonoj de la akcia societo. En la Nov. N-o p. 300 mi havis jam okazon, diri kelkajn vortojn pri la persono de P-ro Poell. Estas vera ĝojo por la redaktoro, ke tiel pia kaj fervora Pastro anstataŭos P-ron Richardson kiel direktoro de E. K., sed ankaŭ, ke, pro la proksimeco de la religia direktoro kaj redaktoro, interkonsiliĝoj estas tre plifaciligitaj, per kio certe nia kara gazeto profitos. Jen estas la oficdona letero episkopa:

EPISKOP-OFICEJO

DE
BUSKODUKO.

Buskoduko, la 3-an de Nov. 1913.

N-o 3586.

Reverenda Sinjoro.

Ĉar la Anonima Akcia Societo „Espero Katolika”, kiu inter aliaj eldonas la internacian Esperantistan periodikon por katolikoj, kaŭze de la morto de Abbé Richardson estas perdinta sian Religian Direktoron, Ni bontrovis nomi Vian Reverendecon „Religia Direktoro” de la nomita Akcia Societo, kiel Ni do faras per tiu-ĉi letero, konfidante ke Vi, Reverenda Sinjoro, kun amo akceptos tiun-ĉi taskon kaj eble plej laŭpove prizorgos la spiritajn interesojn, kiuj al Vi kiel religia Direktoro estas konfidotaj.

Plenestime,

La Episkopo de Buskoduko,
† W. VAN DE VEN.

Al la Rev. Sinjoro

Lamb. POELL,
Tilburg.

La Patronino de I.K.U.E.

En la Oficiala Raporto de „Nia Kvara” estas forgesita, ke la Roma Kongreso laŭ propono de P-ro PLANAS (Hisp.) akceptis kiel patronino de I.K.U.E. „Nian Sinjorinon de l' Espero”

Sub Ŝia potenca protektado I.K.U.E. kresku kaj floru!

Korekto de erara Jarcifero.

Oni bonvolu korekti en E. K. Okt. p. 247, linion 31. Ĝi devas esti jene: „la 17 Marto **1697** jaron, en kiu la plej teruraj persekutaj leĝoj kontraŭ Irlandaj Katolikoj estis faritaj”.

Pagita Kotizaĵo I.K.U.E.-a.

Ofte oni plendas ĉe la redaktoro de E. K., ke neniam aperis komunikoj en E. K. pri pagita I.K.U.E.-mono. La Redakcio deklaras tie ĉi, ke ĝi ricevis neniam nek la kotizmonon mem, nek komunikojn publikigotajn pri pagita kotizmono.

Tiel plendis Kataluna Kat. Ligo — Aŭstria Kat. Ligo — Angla Kat. Ligo. (Ankaŭ P-ro Richardson komunikis al mi private, ke li pagis kotizon por Belga Kat. Ligo).

Enketa demando: La ligoj pagintaj kotizon por la I.K.U.E. Kaso, sciigu al mi *a.* Kiam ili pagis; *b.* Kiom ili pagis; *c.* Al kiu ili pagis.

La respondoj aperos en E. K.

D-ro SM.

Enketo de „Espero Katolika”.

N-ro 8. Respondo al la enketo pri naciaj aŭ regionaj Ligoj de Katolikoj-Esperantistoj.

Katalunlando. Komisiita de nia Ligo kaj kiel rajtigita Delegito de I. K. U. E., en Katalunlando, mi plezure respondas la enketon de „Espero Katolika”.

1-e. *Ĉu en nia nacio aŭ regiono ekzistas Ligo? —*

Jes, en nia regiono Kataluna ekzistas la „**Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj**”.

2-e. *Kiun teritorion ĝi okupas! (ĝiaj limoj)?* — Laŭ nia Regularo ĝi okupas ĉiun teritorion, en kiu oni parolas katalunan lingvon; t. e. Katalunlando, Aragono, Valencio, Balears. Tamen, dume ne ekzistas alia Ligo en Hispanlandaj Regionoj, nia Kataluna Ligo akceptas ĉiujn katolikajn esperantistojn en Hispanlando.

3-e. *Historieto pri ĝia starigo.* — Okaze de la V-a kongreso en Barcelono (jaro 1909), la katolikoj organizis disajn festojn kaj kunvenojn sub la prezido de Abato Richardson kaj kun la efika kunlaborado de P-ro D-ro J. Thatcher, P-ro S. Vial, P-ro M. Lliro, E. P. Ĉar la katolika societo „*Joventut Catolica*” akceptis nin afable dum tiuj tagoj, ni profitis tiun okazon kaj starigis kursojn de Esperanto en la sidejo de tiu societo, kiujn klarigis mi mem kaj P-ro Planell. Kiel rezultato ni organizis karavanon al Parizo okaze la 1-an de Aprilo en 1910, al kiu aliĝis 75 gesamideanoj, el kiuj ĉeestis 7 al la kongreso. Laŭ la deziroj de tiu kongreso kaj laŭ la specialaj petoj kaj komisioj, kiujn al mi kaj al P-ro Vial faris la kongreso, ni fondis la Katalunan Sekcion de I. K. U. E. Ĝia historio de tiam oni trovas facile en la recenzoj publikigitaj en E. K.

4-e. *Kiam starigita.* — En Barcelono je la 6-a de marto 1911-a.

5-e. *Ĉu ĝi havas regule aprobitan regularon?* — Jes.

6-e. *Ĉu ĝi kaj ĝia regularo estas aprobita de la Registaro?* — Jes, laŭ oficiala dokumento de la Provincestro S-ro M. Portela, la 15-an de Marto de 1911-a.

7-e. *Ĉu aprobita de la Episkop(ar)o?* — Nia Episkopa Moŝto de Barcelono aprobis ĝin la 29-an de Marto de 1911-a. Poste ni atingis la aprobon de la Kataluna Episkoparo kaj ĉiuj Episkopoj akceptis la Honoran Prezidentecon de nia Ligo.

8-e. *Ĉu ĝi havas religian konsilanton, kaj se jes, ĉu elektitan de la Episkopo?* — Jes, ni havas, elektitan de nia Episkopo laŭ nia propono. Li estas P-ro Jozefo Planas, el Barbará del Valles samtempe cenzuristo religia de nia Revuo.

9-e. *Kiamaniere la Ligo estas interne konstruita?* — La Ligo akceptas: honorajn, aktivajn, kaj helpantajn membrojn. Ĝi starigas sekciojn ĉie, kie ekzistas kelkaj aliĝintaj esperantistoj. La estraro konsistas el ok, ĉiujare elektitaj personoj, en la ĝenerala kunveno, kaj el ĉiuj Delegitoj en la diversaj urboj. La unuaj decidas la urgajn aferojn, kiujn aprobas ĉiuj poste en ĝenerala kunveno, en kiu oni pri-traktas la ĝeneralajn demandojn. Se okaze estonte nia Ligo malaperos, ĉiuj ĝiaj proprajoj apartenos laŭ la regularo al I.K.U.E. Ĝi havas specialan komisionon por propagando.

10-e. *Kiom estas la deviga kotizaĵo por lo membriĝo?* Unu peseton jare, aŭ 3.50 ptojn se ili ricevas nian Revuon.

11-e. *Kiom da pagintaj membroj ĝi havas hodiaŭ?* — Krom la du societoj: **Katolika Stelo** el *Sabadell*, kaj **Studenta Juneco** el *Ĝerono*, ĝis nun pagis 140 membroj. En 1913 ni pagis 34 jarabonojn al I. K. U. E.

12-e. *Kiu estas ĝia estraro?* — Prezid. S-ro Johano Rosals: adr. Str. Puertaferriŝa 30, Barcelono. Vic-prezid. D-ro J. Casanovas P-ro, Ĝerono. Sekretario P-ro J. Sabaté. Vic-Sekr. P-ro D-ro J. Thatcher. Kasisto M. Gili. Voĉdonantoj: J. Mauri kaj P-ro F. Viver. La Sekretariejo ĉe S-ro Rosals, Puertaferriŝa 30. Barcelona. Oficiala aŭ leĝa sidejo: Str. Cucurulla 9, Pral. (Juventud Catolica). Delegitoj en la I. K. U. E. D-ro J. Coll P-ro, Str. Santa Ana 8, Pral. kaj P-ro S. Vial.

13-e. a) *Ĉu ĝi havas oficialan organon?* Jes, **Kataluna Katoliko**. b) *de kiam aperinta?* — De la 1-a Aprilo de l' 1911-a. c) *kiel ofte ĝi eliras?* — Monate. d) *Kiom da numeroj jam eliris ĝis hodiaŭ?* — Dudek-ses. e) *La redakcio kaj administracio?* — f) *ĝia precisa adreso?* — Puertaferriŝa 30, Barcelono; Direktoro estas S-ro J. Rosals kaj ĉefredaktoro, D-ro J. Coll P-ro. — g) *ĝia abonprezo.* — Senpage por la Liganoj. Fremdlande 3 fr. jare. h) *ĝia proksimuma ekzempleraro.* — 300—400 ekzempleroj monate.

14-e. *Ĉu la Ligo aŭ ĝiaj membroj eldonis aliajn verkojn?* Mi konas neniun, krom kelkajn poŝtkartojn.

15-e. *Rimarkindaj okazintaĵoj de post ĝia starigo*

ĝis hodiaŭ. Unue mi rimarkas la entuziasmon kaj sukceson en la festo ĉiujara, kiun dum Decembro ni dediĉas al nia Sankta Virgulino de la Espero, kiun en Romo I. K. U. E. akceptis ankaŭ tia, laŭ propono de P-ro Jozefo Planas je la nomo de nia Ligo.

Due la sukceson ĉe altrangaj ekleziaj aŭtoritatoj, kiuj permesis starigi la grupon „*Studenta Juneco*” nur por seminarianoj en la Seminario de Ĝerono. Ankoraŭ ĉe la Barcelona Episkopo, kiu alsendis oficialan riprezentanton al la kongresoj de Parizo kaj Romo; plie la mortinta ĉefepiskopo de Tarragona sendis ankaŭ riprezentanton kaj telegramon al la kongreso en Parizo.

Trie ĝi sukcesis, nomigante min kiel oficiala profesoro de Esperanto en la ŝtata Barcelona Universitato. Fine pri sukcesoj de kursoj, ekskursoj, kongresoj k. t. p. vidu E. K.

16-e. *Ĉu la Ligo deziras aliĝi al I. K. U. E., kaj submeti sin al la regularo, starigota dum „Nia Kvina” en Lourdes 1914?* — Nia regularo diras (ĉap. ŝanĝebla) (art. 3-a): Nia Katolika Ligo aliĝas al I.K.U.E. kaj sekve akceptas *ĝian Regularon aprobitan* laŭ la decido de la Unua Kongreso en Parizo je la 1-a Aprilo de l’ 1910-a.

Sekve se oni akceptas **novan Regularon**, nia Ligo Kataluna devos kunveni je ĝenerala eksterordinara kunveno por ŝanĝi la cititan, 3-an regulon kaj prezenti la ŝanĝon al la aprobo de la ekleziaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj. Post tio nia Ligo povos, aŭ ne, akcepti, neniel tamen *ante factum*.

D-ro Joaquim COLL, P-ro.

Barcelono, 12 Novembro 1913-a.

No. 9. Respondo pri la enketo de „Espero Katolika”.

1. En Aŭstrio ekzistas Ligo; ĝia domo estas: Aŭstria katolika ligo esperantista.

2. Ĝi okupas tutan teritorion de „Aŭstrio” (la kronlandoj: Bohemio, Moravio, Stirio, Karintio, Krajno, Dalmatio, Tirolio, Galicio, Bukovino, supra- kaj malsupra Aŭstrio). Nacioj: (germana, bohema (ĉeĥa), pola, itala, kroata, slo-

vaka, rumana, rutena.)

3. S-ro Ulm, veninte de Dresdeno, propagandis Esperanton en submajstra unuiĝo (Gesellenverein) en Wien kaj preparis ekspozicion; S-ro Hörl, instruisto, aŭdis pri tio kaj tuj vizitis S-ron Ulm, al kiu li rakontis, ke li kun S-ro Wesely kaj Aigner lernis Esperanton kaj intencas ĝin enkonduki en junulara ligo. Post kelkaj interparoladoj oni konsentis, ke estu tre necesa havi en nia regno katolikan unuiĝon Esperantistan. S-ro Ulm proponis peti la anon de Lingva Komitato, S-ron J. Schröder, ke li estu la prezidanto de la ligo.

Post la III-a en Budapeŝto, kie ĉeeŝtis S-roj Hörl, Ulm, Wesely, oni ĉion preparis; S-ro Aigner precipe zorgis pri la statutoj, kiuj estas akceptitaj de la registaro, kaj intencis fondi Ligon dum la eŭharistia kongreso post prediko, kiun tre fervore faris Mons. H. Giesswein de Budapeŝto.

Nia prezidanto A. Richardson mem aprobis la statutojn kaj ĝojiĝis pri la proponita estraro de la nova ligo.

4. La 11-an de Septembro 1912 estis starigita la Ligo en Wien.

5. La regularo estas regule aprobita;

6. Ankaŭ de la registaro.

7. Ĝis nun ne ankoraŭ de la Episkop(ar)o, tamen tio okazos certe.

8. Religia konsilanto estas respekt. pastro Dr. Questel (elparolu: Kvestel).

9. La ekzistantaj lokaj grupo aliĝis al la Ligo.

10. Kotizo por la membroj estas jare 1.20 Kronoj (50 Sm.)

11. Proksimume 60 pagintaj membroj.

12. *Prezidanto* de nun estas S-ro kortega konsilisto *Aug. Jungwirth, Wienn II, Capistrangasse 2*; vic-prezidantoj: S-ro Joh. Schroeder, S-ino Emmy de Kubin, Wien, kaj S-ro Benito Ulm, Wien 16, Kirchstetterngasse 16, samtempe: Korespondanto de la ligo; Sekretario: S-ro J. Hörl, instruisto; 2-a Sekretario: S-ro Pawelka, fervojoficisto; Kasisto: S-ro H. Kellner, instruisto; 2-a Kasisto: S-ro Kuhnel, fervojoficisto.

13. Ĝi akceptis kiel oficialan organon „Espero Katolika”

por pli bone subteni tiun ĉi revuon. Due: la eldono de propra organo devus esti nur en Esperanto, ĉar la anoj de nia ligo estas el 8 diversaj nacioj. Trie. Ni iom post iom intencas venki la ĉiutagajn gazetojn naciajn, por ke ili akceptu niajn raportojn, per kiuj ni pli bone disvastigas nian katolikan movadon.

Preskaŭ la triono de niaj membroj estas abonantoj de nia bela revuo „Espero Katolika”.

14. Eldonoj: por la diservo dum la jarkunveno estis eldonitaj de 2 membroj la tekstoj de kantoj kaj ilustritaj karto.

15. Rimarkindaj okazintaĵoj: Du bone vizititaj diservoj kun predikoj.

16. Nia Ligo tuj konsentis la aliĝon al I.K.U.E. La transloĝiĝo de nia kara Kasisto en alia urbo estis la kaŭzo, ke la Ligo ne sendis la kotizon. Nia delegito en Romo preskaŭ ne volis kredi, ke la Ligo ne pagis. Ni konsentis pagi 10 spd. po membro, sed ni proponus pagi de post ĉiujara kongreso de Oktobro 1913—Septembro 1914, kaj dezirus ke la jaro por la I.K.U.E. estu tiamaniere.

N-o 10 RESPONDO EL SAKSUJO (GERM.)

I.

La resaniĝo de la I. K. U. E.

Estis vere belaj, sinceraj vortoj, kiujn parolis la artikolo de nia E. K. (No. 99) pri la orfiĝinta I. K. U. E. Jam de longe la I. K. U. E. anoj el diversaj landoj plendadis vigle pri la malordoj kaj pri la tro grandaj senzorgoj, kiuj regis la I. K. U. E. Sed por ĉiuj plendoj pri la organizacio de I. K. U. E. oni havis nur surdajn orelojn! Ŝajnis, ke oni ne laboris, sed nur ludetis!

Tial ankaŭ la I.K.U.E. perdis multajn fidelajn kunhel-pantojn.

Hodiaŭ oni devas diri: Se la I. K. U. E. ne devas pereji, oni devas *radikale* renovigi la fundamenton de I. K. U. E. Precipe estas necese, ellabori *definitivan regularon* kaj elekti

definitivan estraron, kiu ne nur havas bonan volon, sed ankaŭ la forton kaj la povon, regi nian grandan universalan katolikan unuiĝon.

Perfekte mi akceptas la opinion de la E. K. redaktoro, S-ro Dr. Smulders kaj deklaras jene:

1. Oni baldaŭ komencu starigi laboreman lokan organizan-kaj kongreskomitaton por nia „Kvina”.

2. Oni akceptu la novan projekton de regularo de I. K. U. E. de Pastro Poell, (kiun oni pridiskutu en la E. K. tute antaŭ „nia Kvina”) kaj ŝanĝu ĝin laŭbezzone.

3. Nia oficiala organo E. K. malfermu specialan rubrikon por la diskuto pri la rimedoj por la renovigo kaj revivigo de la I. K. U. E.

En la diskuto oni evitu memkompreneble ĉiun personan konflikton.

Se oni daŭrigos la nunan senzorgegan agmanieron, nia I. K. U. E. perdiĝos malrapide. Tion ni ne volas, tio ne devas esti! Nia kara I. K. U. E. devas prosperi denove, devas iĝi organizaĵo, kiu vere estas servanto de la katolikaj intereso. Por efektivigi tian belan celon, gravaj kaj multe da taskoj atendas, sed la veraj amikoj de la I. K. U. E. ne hezitos plenumi ilin.

II.

Respondo al la Enketo; Germanujo; la Saksa Katolika Ligo.

Je la fino de mia deklaro mi volas respondi la *enketajn* demandojn pri la ekzistantaj naciaj ligoj de Kat. Esp.

1. En Germanujo ekzistas la Bavara, la *Saksa*, la Okcidenta Germana Ligoj kaj diversaj malgrandaj katolikaj esperantistaj societoj.

2. La saksa ligo ampleksas nur la reĝolandon Saksujon.

3. La saksa ligo estas starigita per la instigo de la estro de la bavara ligo de I. K. U. E., S-ro J. Scholz, redaktoro en Augsburg. Ĝia fondinto estis la grafa aktisto Sämmer en Glaŭchaŭ, kiu starigis la ligon per apogo de kelkaj samkredanoj.

4. Ĝi estas starigita en Glaŭchaŭ, en la monato de Septembro 1910.

5. k. 6. La ligo havas regule aprobitan regularon, kiu ne estas aprobita de la Episkopo nek de la Registaro.

7. Nia saksa Episkopo konas nian ligon.

8. Ĝi ne havas religian konsilanton, ĉar tio ne estas necese en Saksujo.

9. Nia ligo havas lokajn grupojn, izolitajn delegitojn kaj izolitajn anojn.

10. La deviga kotizaĵo estas 1 Sm.

11. Ĝi havas 40 pagintajn membrojn.

12. La estraro estas la kuratoraro, kiu konsistas el la delegitoj. La prezidanto estas la ĉefdelegito, grafa privatsekretario Sämmer en Wechselburg, kiu intertempe estas ankaŭ sekretario kaj kasisto. La sidejo estas en Wechselburg.

13. a. k. b. La oficiala organo estas la „Germana Katoliko” kiu aperis de 1910. c. Ĝi eliras monate, kaj kelkfoje dumonate; d. nescio; e. La redakcio kaj administracio estas S-ro R. Scholz, bavara ĉefdelegito de I. K. U. E. f. adreso: Augsburg, Sulzerstr. 17. g. La abonprezo estas 1,5 Sm.; por membroj senpage. h. nescio.

14. La saksa ligo kaj ĝiaj membroj ne eldonis aliajn verkojn.

15. Rimarkindaj okazintaĵoj de la ligo estas la jarĉefkunvenoj en Dresden 1911 kaj Chemnitz 1912. Kun ambaŭ okazintaĵoj estis ligitaj grandaj propagandaj festvesperoj.

16. La saksa ligo jam estas membro de I. K. U. E. kaj submetas sin al la regularo starigota dum „Nia Kvina” en Lourdes 1914.

SÄMMER, Sekretario,

Saksa ĉefdelegito de I. K. U. E.

(La redakcio ricevis ankoraŭ de P-ro Madlener respondon pri la *Bavara Ligo de Katolikaj Esperantistoj*. Sed ĝi estas tro ne kompleta; pli preciza respondo estas dezirinda.)

Kroniko de I. K. U. E.

Opinio pri „Espero Katolika”.

Kiel mi diris en nia Okt. n-o. p. 268, mi kiel redaktoro de E. K. spertis la veron de la proverbo: Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj. Se ne de gravaj personoj mi ricevis mul-

tajn alkuraĝigojn, tute malesperigite mi certe jam de longe estus forlasinta la redaktorecon de E. K. — Novan alkuraĝigon mi ricevis, leginte la opinion de unu el niaj gravaj Esperanto-gazetoj, la *Amerika Esperantisto*, kiu sub titolo „Sur nia Tablo” kutimas preparoli la diversajn Esperanto-gazetojn. Opinio de ne katoliko, de ne-Eŭropano, loĝanta je l' alia flanko de l' oceano kaj de el malproksime trarigardanta la antaŭ si elvolviĝantan pejzaĝon, kaj esprimanta la ĝeneralajn impresojn de la vidaĵoj.

Jen do tio, kion mi legas en *Amerika Esperantisto*, Okt. 1913, p. 33:

ESPERO KATOLIKA. Dekjara gazeto, oficiala organo de la K. E. L. Unu el la plej bonegaj esperantaj eldonaĵoj, rilate bonstilan kaj precizan Esperanton. Celas religian propagandon, pere de Esperanto. Elmontras la perfektan organizon, neŝanceliĝan militadon de la katolika eklezio pro sia kredaro, kaj ankaŭ la indecon de Esperanto por plifaciligi la interrilatojn intimajn de diverslingvaj branĉoj de *iu* organizo. Estus bone se aliaj eklezioj estu egale progresemaj, kaj vekiĝu al la povo de Esperanto kiel interkomunikilo.

GRAVA SUKCESO DE I.K.U.E.

La Kvara Kongreso de l' Evangelio

Paris, 7-8-9 de Novembro 1913.

Sekcio Esperantista.

Temo: La Evangelio kaj la Sociala demando.

En nia Roma kongreso oni jam atentigis pri la *Ligo de l' Evangelio*, kiu estas laŭkanone starigita kiel „kunfrataro” en Montmagny Eparĥio de Versailles, laŭ ordono de Mons. GIBIER. Ĝia direktoro estas Rev. S-ro Kanoniko GARNIER, en Montmagny apud Paris (S. et O.), France.

P-ro RICHARDSON, tuj post konatiĝo kun ĝi, entuziasmiĝis pri tiu bela kaj grava Ligo, kaj ne atendante unu momenton, rapide presigis en Esperanto la Statutojn de la Ligo. Estis lia lasta verkaĵo; apenaŭ ĝi estis eldonita, jen la ĉiam junkora maljunulo RICHARDSON forvojaĝis de nia tero ĉielen. Resume la Ligo de l' Evangelio celas disvastigi la konadon kaj praktikadon de la Evangelio en la popolo; la membroj promesas legi ĉiutage kelkajn paĝojn el la Sankta Libro.

Antaŭ unu monato okazis la IV Kongreso de l' Evangelio en Paris. S-ro COLAS dissendis cirkuleron en Esperanto, en kiu li petis raportojn de alilandanoj, ĉar la kongreso akceptos por la fremduloj, kiuj bonvolos partopreni en la kongreslaboroj, la uzadon de Esperanto.

Kvankam la cirkulero estis dissendita nur kelkajn semajnojn antaŭ la Kongreso, tamen alvenis *20 raportoj el dek fremdaj nacioj*.

La honora Komitato de la Kongreso konsistis el 11 kardinaloj-ĉefepiskopoj.

La 7-an de Nov. okazis la unua kunsido matene, sub la prezido de lia Em. Moŝto Kardinalo AMETTE, ĉefepiskopo de Paris. En tiu kunsido S-ro COLAS, kiel delegito de la katolikaj Esperantistaj grupoj, raportis pri „la Evangelio kaj la sociala demando en la diversaj landoj de la mondo”. La raportoj de niaj samideanoj tie estis prezentitaj en ĉeesto de Kardinalo AMETTE. La konkludo de ĉiuj fremdlandaj raportoj enhavas la urĝan neceson „prediki la Evangelion en ĉiuj nacioj” kaj doni al la Ligo de abato Garnier disvastiĝon tutmondan. Tiu konkludo estis unanime aprobita de la kongreso.

Tiel nia I.K.U.E., dank' al la agemeco de S-ro Colas, tre ageme partoprenis al la kongreso kaj kunhelpis al ĝia sukceso.

En *Le Peuple Français*, la organo de la Ligo, ni legas, ke abato GARNIER ofte atentigis la kongresanojn pri la grandegaj servoj, kiujn povas fari Esperanto al la Katolika afero kaj li montris la malsaĝecon de kelkaj antaŭjuĝoj disvastigitaj kontraŭ Esperanto.

La Kongreslibro, kiu enhavas ĉiujn raportojn (ankaŭ de la Esperantistoj) estas mendebla ĉe kanoniko GARNIER. Sufiĉas sendi frs. 1.25 (0.50 Sm.) al lia adreso.

D-ro SMULDERS.

Enhavo de la Jarkolekto 1913.

Artikoloj.

Pri la libro de Jobo (B) p. 3. — Pilgrimo al la Sankta Lando (R.) p. 8; p. 39. — La Katolika Gazetaro kaj Katolika Telegrafagentejo (JANSSEN) p. 19; p. 218. — In memoriam Arthur Lloyd (N.) p. 24. — Ni militu kontraŭ alkoholismo (D.) p. 35. — La Fasto de S-ino Z. (R.) p. 66. — La Katolika Pedagogia Tutmonda Ligo (T.) p. 73. — Unu Ŝafejo kaj unu Paŝtato (SEVERIJNS) p. 76. — Nia Sinjorino de Espero (ROUB) p. 78. — La arĝenta Virgulino (ROUB) p. 81. — Apologio: nesuspekta atesto (S.) p. 97. — Prediko dum „La Oka” en Krakovo (SZUREK) p. 102. — Esperanto kaj la pacmovado (MAURY) p. 110. — Cirkulero pri La Naŭa en Bern, p. 111. — Konvertiĝo de Anglikanaj monaĥoj kaj monaĥinoj (PARKER) p. 129. — Pri Kristana Reunuiĝo; parolado dum „Nia Unua” (N.) p. 131. — Romo kaj la Papo (Roub) p. 142. — La Monaĥoj de Caldey (N.) p. 161. — La Katolika Eklezio juĝata de Protestanto (R.) p. 172. — La Eklezio en jaro 1912 (MADLENER) p. 173. — Esperanto kaj la Framasonaro (RICHARDSON) p. 177. — Letero al S-ino Z. (R.) p. 193. — La Pastro (BRÜCKNER) p. 196. — Signoj de Allah (SCHRÖDER) p. 198. — Katolikaj Societoj (B.) p. 200. — Esperantomovado: oficialaj sciigoj de la Lingva Komitato, p. 229. — P-ro Austin Richardson † (R. kaj S.) p. 233. — La Orfiĝinta I. K. U. E. (S.) p. 237. — Esperantista Movado inter Katolikoj de 1887—1910 (DOMBROWSKI) p. 277. — Ekskursoj kaj Pilgrima Vizito al la Sanktaj Lokoj de l’ Eterna Urbo (LEHNER) p. 286; p. 327 — Memoroj pri la lastaj tagoj de P-ro Richardson (COLAS) p. 313 — Parolado apud la ĉerko de P-ro Richardson (COLAS) p. 317 — La Kiew’a Proceso-Protesto (E. T. M.) p. 319 — La Konstantina Jubileo, p. 321 — Mediolana Edikto (WIERSCHOWSKI) p. 323

Poezio: Ludiloj (R.) p. 65. — Batalhimno Esperantista (kun muziko) p. 93. — Antaŭ la plej Sankta Sakramento (T.) p. 141. — „Dio Geometrias” (DOERNER) p. 145. — La Anĝela Saluto (Muziko) p. 232.

Katolika Vivo Ĉiulanda: Salutparolado de Princo Sapienĥa dum Eŭkaristia Kongreso, p. 27. — Kiajn fruktojn produktas tutkatolikaj registaroj (PAJOR) p. 29. — La Oktavo de Preĝado (N.) p. 30. — Balkanaj Landoj (BENKOVIĈ) p. 31. — Religia kaj nereligia instruado en Kanado (MOJADO) p. 60. — Morto de Kardinalo Nagl (WESELY) p. 87. — Novaj progresoj en Aŭstrio (WESELY) p. 114. — Nokto en la Sankta Tombo (MERCIECA) p. 147. — La nacia kongreso de la Kat. Junularo franca. — Ozanam (Roub) p. 152. — Adolf Kolping kaj lia Verko (W.) p. 202. — Lia Moŝto Kardinalo van Rossum en Nederlando (PASTOOR) p. 207.

Kroniko de I. K. U. E.: La preparanta Komitato de la 4-a kongreso Katolika kaj Pilgrimo en Romo. p. 49. — Katolika Esp. Societo „Berlin” (FROMM) p. 52. — Esperanto-tablo „Verda Stelo” kaj „Vindobona”, Wien (U.) p. 54. — Nederlanda Katoliko (JANSSEN) p. 57. — Kat. Esp. Societo de Jeruzalemo (SCHMITZ) p. 57. — Kat. Esp. Mov. en Katalunlando (PLANAS) p. 58. — En Parizo,

p. 59. — Sciigoj pri la Aŭstria K. L. E. (U.) p. 84. — Aŭstria Katolika Ligo Esperantista. (WESELY) p. 87. — Katolika Antaŭ-kongreso en Milano? (B.) p. 123. — Italujo, p. 124. — Programo de la IV-a Of. Jarkunveno de Nederlanda Katoliko, p. 125. — Nederl. Kat. Ligo „N. K.“ (v. ZWET) p. 153. — Oficialaj Sciigoj pri la Aŭstria Kat. Ligo Esp., p. 212. — Katolika Grupo en Nice (CAUVIN) p. 215. — Esperanto-tago en Tilburg, Ned. (S.) p. 216. — Katolika Movado en Katalunlando (COLL) p. 274. — Opinio pri E. K., p. 344. — Sukceso de I.K.U.E. dum la IV-a Kongreso de l' Evangelio en Parizo (S.) p. 345. —

Oficialaj Komunikoj: Al la Legantaro (SLEIJFFERS) p. 1—p. 33. — Komunikoj de la Redakcio, p. 34—p. 126—p. 159—p. 229—p. 269—p. 312. — I Mia eksigo kiel ĝen. Sekr. de I.K.U.E. Respondo al informpetintoj (K.) p. 119. — Sciigoj pri la arĥivo de I.K.U.E. (K.) p. 227. — Al la Akciularo de la Akcia Societo „E. K.“ (K.) p. 228. — **Nia Kvina:** La Preparanta Komitato de la 4-a Kongreso Katolika kaj internacia Pilgrimo, p. 49. — Letero-cirkulero pri la internacia Pilgrimo Katolika (COLAS) p. 121. — Informoj pri la Int. Kat. Pilgrimo kaj Kvara Katolika Kongreso en Romo (COLAS) p. 221. — Pri la Pilgrimo kaj la Kongreso en Romo (S.) p. 240. — Oficiala Raporto de la Kongreskunsidoj (MILSOM) p. 243. — Respondo pro protesto (COLAS) p. 311. — Ĝenerala kunveno de la akciuloj de „E.K.“ (S.) p. 263. — Nia Gazeto „Espero Katolika“: dekjara ekzistado (S.) p. 267. — Nia ĉefestraro de I.K.U.E., p. 269—p. 335 (adresoj). — Novaj Religia Direktoro kaj Prezident-Komisaro de E. K. p. 335—p. 336 — La Patronino de I.K.U.E., p. 337 — La jarlibro de I.K.U.E., p. 269. — La **Regularo de I.K.U.E.**, p. 270. — Komunikado de la Ĉefestraro pri la regularo, p. 295. — Statutprojekto pri la I.K.U.E., kun rimarkoj (POELL) p. 296. — Pri la Statutprojekto (S.) p. 300. — **Enketo** de „Espero Katolika“ pri la ekzistantaj Ligoj Katolikaj, p. 272. — Respondoj: Angla Ligo Kat., p. 305. — Nederlanda Ligo Kat., p. 207. — Kat. Grupo en Berlin, en Bromberg, p. 310. — Irlando, Bordeaux, Grandduklando Oldenburg, p. 311. — Kataluna Ligo Kat., p. 337 — Aŭstria Ligo Kat., p. 340. — Saksa Ligo Kat., p. 342. — Enketo pri pagita I.K.U.E.-Kotizaĵo, p. 337 — Letero de nia Prezidento al la E.K. legantoj (PARKER) p. 331.

Bibliografio: *Esperanto-Movado:* La Oka Kongreso en Krakovo (RICHARDSON) p. 63. — La Naŭa Esp.Kongreso; Belgaj Kongresoj; Godesberg apud Rejno, p. 89. — Oficialaj sciigoj de la Lingva Komitato, p. 229. — *Miksaĵo:* Reĝkonfesprenanto (SAGRERA) p. 95. — Bohemaj proverboj, p. 61—p. 96. — Italujo; morto de Mgr. Delamaire, p. 231. — Miksaĵo pri Nia Kvara, pri Ido k.t.p. (S.) p. 183.

Mallongigoj: **B** = Bianchini; **D**esray; **K**naapen; **N**ankivell; **R**amo; **M**ax **R**oub; **S**mulders; **T**asbender; **U**lm.

